Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵa Letero de **Federacio de Aŭstraliaj Esperantistoj**
NI SENDAS AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KUN KONATA RETADRESO

auto 21/04/2012 Kvardektria Eldono 2012 29/04/2012 SENDITA

Tiu ĉi letero havas "hiperligilojn" al retpaĝoj KLAKU! KLAKU! KLAKU!

Sendu novaĵojn, leterojn, informojn al Roger rspring@tpg.com.au; kaj kopiojn al Ivan ivan@melburno.org.au;

La Informa kaj noma paĝoj nur aperos je la dekaj kaj dekkvinaj eldonoj

GRAVAJ DATOJ (se erara, informu min. rspring@tpg.com.au)

Esperanto havos 125 jarojn je 26a Julio, 2012

La AEA-jarkongreso okazos en Brisbane 28 septembro ĝis 1 oktobro 2012,

La AEA-somerkursaro en Sidnejo estos 11 ĝis 28 januaro 2013.

Jonathan Cooper prelegos pri "Moderna arto": 26 majo 2ptm Esperanto Domo, Redfern

"**SudAŭstralia Vintro-Esperanto-Evento** okazos en Adelajdo kaj apuda Sheidow Park Ŝtat-Lernejo ekde la vespero de vendredo la 8a ĝis la vespero de lundo la 11a de junio 2012 (la naskiĝdatreveno de la Reĝino).

Tim Morley kaj Esperanto

"Springboard to Languages"



Logikaj kialoj por instrui Esperanton al lernejanoj. Nun la facila bekfluto helpas la instruon de muziko en lernejoj, simile la facila Esperanto povus helpi la instruon de lingvoj en lernejoj.

http://www.youtube.com/watch?v=8gSAkUOElsg

Nicole Else nicole@cryogenic.net

(ankaŭ guglu “Springboard to Languages” kaj http://www.springboard2languages.org/home.htm)

JoMo kantas La virbovo kiu ekamis la lunon.
http://lataayoutube.org/video/cWx3KrwXAHs/JoMo%20=%20La%20Virbovo%20kaj%20la%20Luno.htm
Roger Springer rspring@tpg.com.au

Jen kie eblas aĉeti T-ĉemizojn por reklami pri Esperanto.
http://esperanton.com/index.php
Nicole Else nicole@cryogenic.net



Esperanto and Esperantists Dec 17, 2008
Roger Springer rspring@tpg.com.au

Tutmonda Muziko – Esperanto
La komponisto Rainer Conrad kaj la kantistino Karin Rosov ne estas esperantistoj, sed ili estis ĉarmitaj pro "la senlandlima lingvo" kiun lernis tiam Gunter Koch Roger Springer rspring@tpg.com.au

Anjo Amika kantas la faman katolikan preĝon en Esperanto.
Kantistino el Hungario, kies vera nomo estas Anna Lászay. Partoprenante E-aranĝojn, Anna akiras multajn geamikojn tial ŝia esperanta kromnomo estas Anjo Amika. Roger Springer rspring@tpg.com.au



Esperanta Retradio
Pozitiva agado sukcesigas
http://peranto.posterous.com/pozitiva-agado-sukcesigas
Nicole Else
nicole@cryogenic.net

La Universala Lingvo de Sam Green,

Karaj Amikoj

Mi estas parto de la teamo, kiu distribuas novan dokumentfilmon pri Esperanto kaj la historio de ĝia movado, La Universala Lingvo. Sam Green, la reĝisoro, estis kandidato por la Oskar-premio por alia filmo. Se vi ne konas la filmon, jen retejo kun pliaj informoj: www.dokumentafilmo.com

Ni ekscitiĝas pri la datrevena jaro 2012 kaj interesiĝas helpi pri viaj klopodoj disvastigi Esperanton. Mi kontaktas vin por ekscii ĉu vi eble interesiĝas prezenti La Universalan Lingvon en **Aŭstralio** kiel parto de la datrevena festo. Ni povus disponi la filmon al vi je minumuma kosto kaj povus ankaŭ disvastigi la eventon per nia retejo. La filmo estas subtekstita en 19 diversaj lingvoj (jen vi povas vidi la liston: http://esperantodocumentary.com/eo/store#dvd).

Ni esperas, ke La Universala Lingvo povas esti efika ilo por enkonduki neesperantistojn al la lingvo kaj ĝia historio. Laŭ nia sperto, post kiam oni vidas ĉi tiun filmon, neesperantistoj scivolemas pri kaj malfermas sin al la ideo lerni pli pri Esperanto.

Bonvolu diri al mi, ĉu vi interesiĝas pludiskuti tion. Plej bonan ŝancon pri viaj klopodoj.

Sincere,
Sam kaj la teamo de La Universala Lingvo
https://www.facebook.com/EsperantoDocumentary

Atestanto al Historio (pri parto de La Universala Lingvo)

http://esperantodocumentary.com/blog/atestanto-al-historio

Konstruo de la Esperanta Monumento sur Texel Insulo, 1935

http://www.youtube.com/watch?feature=player_embedded&v=7RxxRVZ9F8o

FEMINISMO KAJ LA ESPERANTO-LINGVO

En AE41, mi skribis pri la feminisma libro de Ĝura, kiun legis kune membroj de unu el la ĉiusemajnaj E-grupoj en Adelajdo. Nova membro de alia el niaj ĉiusemajnaj grupoj, Brodie May, havas feminisman vidpunkton pri la lingvo mem. Li tiom interesiĝas pri la konstruado de regulaj, facile lerneblaj lingvoj, ke li mem jam inventis tri el ili. Li ankaŭ ekedukas nin pri Riismo, iĉismo, kaj aliaj proponoj por doni al esperantistoj la eblon sengenre paroli pri nekonato. Se tiaj ideoj interesas ankaŭ vin, simple guglu "Riismo" por

pli detale informiĝi pri ili.
(Parenteze: Ĉu vi legis ke la sveda lingvo nun adoptas novan seksneŭtralan triapersonan pronomon?)
Max Wearing.

ĈU DEMENCO-KOMENCO AŬ KOMENCO-DEMENCO?

La mencio de la supra komento memorigis min pri mia ŝoko, kiam mi relegis mian artikoleton pri Ĝura, kaj trovis en ĝi treege elementan eraregon. Ĉiam estas facile fari tajp-, gramatik-, kaj alispecajn eraretojn, **SED** komenci frazon per subjekto en la akuzativo estas aparte hontiga pekego, ĉu ne? Mi pardonpetas.
Max. Max Wearing mwearing@internode.on.net

Tutmonda helplingvo por ĉiuj homoj

En la Angla Lingvo re google translate
http://googletranslate.blogspot.com.au/2012/02/tutmonda-helplingvo-por-ciuj-homoj.html

Vortoj de "Lernu" Plenigaĵo de paĝo

PUFO
1. Plenblovita aŭ plenŝtopita elasta saketo, cilindro kaj simile, uzata por seĝoj, fenestraj kontraŭventiloj kaj simile:
Estas tre komforte sidi en ĉi tiu pufseĝo.
La vangoj de la knabineto estis pufaj kaj ruĝaj.
Ni spektis la filmon kaj manĝis pufitan maizon.
Mi pufigis la kusenon, plenŝtopante ĝin per plumoj.
La konflikto ĉiutage pufiĝas.
Montru al la kuracisto vian pufiĝintan vundon.
2. Ronda mola elstaraĵo el ia materialo en vesto, hararo kaj simile:
Kion vi konsilus al mi uzi por ke ne estu pufoj en la hararo?

REKLAMO
Alvoko al la publiko per ĉiuspecaj rimedoj por laŭdi kaj rekomendi komercaĵon, entreprenon aŭ ian aferon:
Tiu sensacio estis bona reklamo por la famuloj.
Ĉe ni estas malpermesite reklami cigaredojn en televido.
Ŝi evitas aĉeti reklamatajn aĵojn.
La tuta muro estis kovrita per reklamaj ŝildoj.
Reklamado en tiua gazeto multege kostas.
Mi ofte ricevas diversajn reklamilojn.
Tio estas pufreklamo! Mi provis ĉi tiun aĵon, sed ĝi ne estas tiel bona, kiel oni diras.